

Revigligo de Demokratio

Trejnresio liverita en Arrout (Francio), la 25-an de junio 2022

Trejnistoj:

- Ana Ribeiro
- Chloé Izquierdo
- Jonathan Schneider

Daŭro: 1h20

Celoj:

- Rememori kio estas “ideala” demokratio
- Enkonduki la 4 tipojn de registaroj
- Analizi diversajn landojn laŭ la Demokratia Indekso
- Konkludi pri kion eblas fari por Demokratio
- Informi pri kampanjo de KdE

Blokoj:

1. Rememori kio estas “ideala” demokratio

Respondeculo: Chloé

Tempdaŭro: ~10 min

Peti al partoprenantoj diri kion ili komprenas pri demokratio (kion devas enhavi demokratio) kaj kompletigi se io mankas el la partoprenantoj.

Kio estas demokratio kaj ideala demokratio?

Aktivaĵo: la partoprenantoj devis skribi sur glupaperetoj kio estas laŭ ili demokratio.

Difino: demokratio estas politika sistemo fondita dum la kvina jarcento antaŭ Kristo, fondita far Periklo. La celo estas ke la popolo povas elekti si mem leĝojn kaj kiel funkciigi la ŝtaton.

Debato.

2. Enkonduki la 4 tipojn de registaroj laŭ la Demokratia Indekso

Respondeculo: Ana

Tempdaŭro: ~10 min

Enkonduki pri:

- Plena demokratio
- Neplena demokratio
- Miksita Sistemo
- Aŭtokrataj reĝimoj

La Demokratia Indekso estas indekso farita de la revuo “The Economist” ([vidu ĉi tie](#) la 2021-indekson kun ĉiuj ĝiaj kriterioj, kaj legu pli pri ĝi en [Vikipedio](#)). Ĝi interalie ĝi klasifikas la registarojn de la landoj en 4 kategorioj:

Plenaj demokratioj: Landoj en kiuj ne nur bazaj politikaj kaj civilaj liberecoj estas respektataj, sed kiuj ankaŭ tendencas esti subtenataj de politika kulturo favora al la prospero de demokratio. La funkciado de la registaro estas kontentiga. Amaskomunikiloj estas sendependaj kaj diversaj. La juĝistaro estas sendependa kaj juĝaj decidoj estas devigitaj. Estas nur limigitaj problemoj en la funkciado de tiaj demokratioj.

Neplenaj demokratioj: Tiuj landoj ankaŭ havas liberajn kaj justajn elektojn kaj, eĉ se ekzistas problemoj (kiel ekzemple malobservo de amaskomunikila libereco), bazaj civilaj liberecoj estas respektataj. Tamen, ekzistas signifaj malfortoj en aliaj aspektoj de demokratio, inkluzive de problemoj en administrado, malbona politika kulturo kaj malaltaj niveloj de politika partopreno.

Miksitaj Sistemoj: Elektoj havas grandajn neregulaĵojn, kiuj ofte malhelpas ilin esti kaj liberaj kaj justaj. Registara premo sur opoziciaj partioj kaj kandidatoj povas esti ofta. Gravaj malfortoj estas pli ĝeneralaj ol en neplenaj demokratioj: en politika kulturo, funkciado de registaro kaj politika partopreno. Korrupcio tendencas esti ĝeneraligita kaj la juĝaj decidoj estas malfortaj. La civila socio estas malforta. Tipe, estas ĉikano kaj premo kontraŭ ĵurnalistojn.

Aŭtokrataj reĝimoj: En ĉi tiuj ŝtatoj, politika plureco estas neekzistanta aŭ tre limigita. Multaj landoj en ĉi tiu kategorio estas diktatorecaj. Kelkaj formalaj institucioj de demokratio povas ekzisti, sed tiuj apenaŭ havas povon. Elektoj, se ili okazas, ne estas liberaj kaj justaj. Estas malrespekto de civilaj liberecoj. Amaskomunikiloj estas tipe ŝtataj aŭ kontrolitaj de grupoj ligitaj al la reganta registaro. Kritiko al la registaro estas subpremataj, estas cenzuro. Ne ekzistas sendependa juĝistaro.

Demandi pri la elcento da mondpopolaro kiu vivas en ĉiu sistemo.

Fonto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Demokratieca_indekso

3. Analizi diversajn landojn laŭ la Demokratia Indekso

Tempodaŭro: ~30 min

- a. Usono
 - i. Respondeculo: Ana
- b. Francio
 - i. Respondeculo: Chloé
<https://www.la-croix.com/France/France-est-elle-democratie-defaillante-2021-02-05-1201139066>
- c. Germanio
 - i. Respondeculo: Jonathan (dua respondeculo: Ana)
- d. Rusio
 - i. Respondeculo: Chloé
<https://www.radiofrance.fr/franceculture/la-russie-est-elle-une-dictature-4536741>
- e. Hong Kong
 - i. Respondeculo: Jonathan (dua respondeculo: Ana)

4. Konkludi pri la degeneraj demokratioj kaj kion ni povas fari

Tempodaŭro (15 min)

Respondeculo: Jonathan (dua respondeculo Ana)

5. Informi pri la kampanjo de KdE (5 min)

Tempodaŭro (5 min)

Respondeculo: Ana

Entute: 1h10m da trejnadtempo. 10 minutoj da ĥaoso.

Trejnpiano

Elemento	Min	Celo	Aldonaj informoj por klarigi al la trejnatoj
Diskutado	10min	Rememori kio estas demokratio kaj kio estas ideala demokratio	-Origino de demokratio -Elementoj de demokrata sistemo

Teorio kaj aktivaĵo	10 min	Enkonduki la 4 tipojn de registaroj laŭ la Demokratia Indekso	Trovi la diversajn tipojn de registaroj pri kiuj la trejnatoj lernis
Teorio kaj diskutado	30 min	Analizi diversajn landojn laŭ la Demokratia Indekso	La trejnatoj lernis pri diversaj demokratiaj situacioj en la mondo
Teorio	15 min	Konkludi pri degeneraj demokratioj kaj kion ni povas fari	Konsciigi al la trejnatoj la gravecon de demokratio
Ĥaoso	~10min	-	-



